Geoffrey Sutton estas profesie redaktoro/libroprojektisto kaj estis specialisto pri skandinaviaj kaj finn-ugraj lingvoj. Li naskiĝis en 1947 kaj esperantistiĝis en 1962. En 1966 li estis ano de la loka kongresa komitato de la Brita Esperanto-Kongreso en Norwich. Dum 1969 li volontulis en la Londona oficejo de Brita Esperantista Asocio. Li poste estris la Libroservon de Universala Esperanto-Asocio (UEA) en Roterdamo dum tri jaroj ĝis 1972.

Sian universitatan edukon li ricevis precipe en la Universitato de Uppsala, Svedio. Li laboris dum unu jaro en Pekino ĉe la gazeto 'El Popola Ĉinio' kaj tie helpis en la eldonado de libroj, kiel ekzemple 'Ĉina Antologio 1919-49'. Li poste prelegvojaĝis tra Japanio, Koreio kaj Kanado pri siaj spertoj en Ĉinio. Li duan fojon oficis ĉe UEA de 1983 ĝis 1986 unue kiel libroprojektisto (i.a. 'Faktoj kaj Fantazioj' de Marjorie Boulton kaj 'Vetero kaj Klimato de la Mondo') kaj poste dum du jaroj kiel la redaktoro de la revuo 'Esperanto'.

Li tradukis en Esperanton la librojn 'Sepdek Sep Ŝlosiloj pri la Japana Civilizacio' kaj 'Kio estas Demokratio?' (Unesko/UEA) el la angla kaj artikolojn el nordlandaj lingvoj. Li nun estas la brita peranto de UEA.

Bill Walker

Proposed by Joyce Bunting

Seconded by Norah Brown

From WGT (Bill) Walker.

Mi estas profesia inĝinero, kiu esperantiĝis en 1986. Mi uzas nian lingvon por korespondi kun eksterlandaj plumamikoj, legi internaciajn gazetojn, kaj vojaĝi al internaciaj kongresoj. Mi unue iĝis protokola sekretario de EAB en 1994; mi ankaŭ helpis pretigi edukajn kaj reklamajn materialojn, ordigi bendojn por la bendoteko, kaj plej laste intertrakti pri la nova oficejo de EAB. Mi opinias ke la plej bona reklamo por Esperanto estas montri ke, kaj kiel, homoj uzas la lingvon, do mi taksas nian edukajn agadojn tre gravaj. Laŭ mi ni disdonu diversajn kursojn kaj lerneblecojn, ĉar ne ĉiuj homoj emas lerni laŭ la sama maniero aŭ per la sama metodo – tamen ni nur komencu tiujn projektojn, al kiuj ni povos doni sufiĉe profesinivelan kaj longdaŭran subtenon.

Eric Walker

Proposed by Ian Fantom

Seconded by Grahame Leon-Smith

This past year has yet again been marked by falling membership (I believe in facing unpleasant facts honestly). However, the desks are now about clear for action and with the Management Committee working hand in hand with the Director of Development, giving guidance to the Publicity sub-committee, we should soon get out some promotional material, start to issue press releases and do whatever else is necessary to get EAB moving positively again. I founded an educational charity some forty years ago and am currently a trustee of two Quaker charities and consider that I have some business experience to offer.

My personal opinion is that Esperanto is excellent for widening one's horizons, making new friends from different cultures and altogether enriching one's life. This has certainly happened in my case. Esperanto has helped me 'to reach the corners that other languages don't!'.

If you are an EAB member with voting rights (i.e. have paid the £25 or £20 subscription, or are a life member) and you unable to attend the AGM in person, you can appoint another member with voting rights as your proxy, by giving at least 14 days' notice to the EAB office, naming the person who will serve as your proxy. If you wish, you may nominate the chairman of the meeting (himself a full member) to serve as your proxy; if you do this you must give a clear direction on how you want him to cast your vote. You will receive a proxy form as part of the A.G.M. agenda.

From Malcolm Jones.

Reasons why English is so hard to learn!

The bandage was wound round the wound.
The farm was used to produce produce.
The dump was so full that it had to refuse more refuse.
We must polish the Polish furniture.
He could lead if he could get the lead out.
The soldier decided to desert his dessert in the desert.
Since there is no time like the present, he thought it was time to present the present.
A bass was painted on the head of the bass drum.
When shot at the dove dove into the bushes.
I did not object to the object.
The insurance was invalid for the invalid.
There was a row among the oarsmen about how to row.
They were too close to the door to close it.
The buck does funny things when the does are present.
The wind was too strong to wind the sail.
After a number of injections my jaw got number.
Upon seeing the tear in the painting I shed a tear.

COMPUTER CORNER

I heard of an interesting Internet web site which will automatically translate from English into Esperanto or vice versa! I tried it with a simple sentence 'My name is Eric Walker and I live in a small town with the name of Ipswich'. It translated it absolutely correctly with the exception that instead of 'vivas;' it wrote 'viv'. If you want to try it out, log on to <http://traduku.net>

Message to those who want to go more deeply into the use of Internet with Esperanto! Log on to the EAB-Netnews web site esperanto.org/uk/eabnetnews and here you will from time to time find interesting items put on by Ian Fantom.

KIEL PETI SUBVENCIOJN DE UEA?

La Estraro de UEA kaj la Centra Oficejo regule ricevas petojn pri subtenado de diversaj E-projektoj. Ofte tiuj petoj estas subtenindaj kaj subtenataj, sed eĉ pli ofte evidentiĝas, ke la subvencipetantoj ne klare imagas la renkontajn postulojn de UEA. Tial dum la januara kunsido de la Estraro estis akceptita regularo "Kriterioj kaj procedo por elekto de finance subtenotaj projektoj". Ĝi rilatas al ĉiuj projektoj, en kiuj la kontribuo de UEA devus superi 500 eŭrojn.

La unua kriterio por la subteno de iu projekto estas deklarita ĝia utileco por la E-movado. Oni krome notas prioritatecon de projektoj, en kiuj la subvencipetantoj mem finance partoprenas.

En la procedo elstaras postulo, ke la subvenciotaj projekto estu prezentita al UEA ses monatojn antaŭ la komenciĝo. Oni firme anoncas, ke jam komenciĝintaj sen antaŭa interkonsento projektoj ne estos traktataj.

La plena teksto de la regularo troveblas en la parto "Dokumentoj" de la retejo www.uea.org aŭ estas petebla de Ans Bakker <ans.bakker@esperanto.org>, la estrarano de UEA pri financoj.

DAVID FEATHERSTONE

A Memorial Service will be held for David at Hinde St, Methodist Church, London W.1. On Sunday May 12th at 3.15pm.

Further details from Kevin Bourne
Tel: 01737 248 532

Balta Esperanto Forumo. July 14-18 2002

The editors of 'La Ondo de Esperanto', who have just moved from Ekaterinburg to Kaliningrad, the Russian enclave at the Baltic sea between Poland and Lithuania, are organising this holiday.

A full printout of the text of a long description of it is available by email from Eric Walker or, if you send an s.a.e., he will post a copy to you.

A brief summary shows that there will be a good cultural programme (discussion of Varankin who wrote 'Metropoliteno' - about Eugene Onegin - seminar about literature criticism etc) plus a good social life and tours in the locality. Total cost for 5 days is about £75 plus meals (which are cheap).

HELP !?

One of the great strengths of the Esperanto community has always been the phenomenal contribution by individual members of time and effort to do the 1001 things necessary in a movement such as ours. 140 Holland Park Avenue was run as much by volunteers as by staff and, of course, local groups and federations are run entirely by their members - not to mention all the *fakorganizoj* and publications in which our community abounds.

One snag about Barlaston - almost the only one, in fact - is that there are fewer members and supporters within easy reach than in London. Nevertheless, there are lots of things that need doing that can be done elsewhere, with support from the office. Paul Gubbins and Simon Davies produce *La Brita Esperantisto*; Arnold Pitt, and Rosalind Walter look after courses and examinations; Kate Hall and others look after liaison with Africa (not to mention the Norwich Jubilee foundation which is, of course, independent); Geoffrey King, our Honorary Librarian, directs library and archive policy from deepest Suffolk; Terry Page co-ordinates arrangements for the AGM/Congress; Ian Fantom edits NetNews (the electronic newsletter) and Eric Walker this illustrious publication (*Update*); Paul Hewitt co-ordinates the Book Service, while Ellen Rooney helps with processing orders; Joyce Bunting does a mountain of work on the financial side; Geoff Sutton looks after UEA subs and related matters, while Roy Simmons, Angela Tellier and Malcolm Jones do a power of work in ETA, with whom of course EAB has a good, collaborative relationship; everyone on ManCom has a specified responsibility; and more than 30 members help out as tutors on our several correspondence courses. And none of them lives in Staffordshire!

We already have the names of 20 or so members and supporters prepared to contribute as volunteers - in publicity, translation, media work, occasional hospitality, historical/ research enquiries, tutorial work and the various other areas mentioned above. But we can always use more help, especially as - ahem! - some of us feel the need to cut back a bit on our commitments.

So - yes, you're way ahead of me! - if you would like to be more involved in some aspect of our work at national level, just drop me a note - e-mail or hand-made - at Barlaston and we'll send you a simple proforma for the file. Please, don't think you have nothing to offer! - we can use just a few hours a month, and there is almost no talent that we can't use, so if you would like to contribute, even if you're unsure how, let me know - and I'll think of something!

PS - when necessary, we can make accommodation available at Barlaston - and the cooking is superb!

David Kelso Director of Delegation !!

Konferenco de Internacia Naturkuracista Asocio!

Internacia Naturkuracista Asocio (INA), ĝis nun iom dormeta, decidis enkonduki elementojn de profesia laboro. Laŭ la decido de ties prezidanto, s-ro Chong Puramo, estis enkondukita parte salajrata sekretario. Tio jam plivigligis la INA-estaron kaj aperis decido okazigi kelktagan konferencon por nevenontoj UK-n en Brazilo. Des pli, ĉar enkadre de UK-oj ne sufiĉas da tempo por fundaj diskutoj. Antaŭstaras refari la statuton kaj levi la INA-laboron sur pli altan nivelon. Ni petas al legantoj plidivastigi jenan anoncon:

Unuan fojon, ekde la fondiĝo, la Internacia Naturkuracista Asocio organizas 6-tagan Konferencon en Eŭropo (19-24.08.2002 en Krefeld, Germanio). Estas invitataj ne nur INA-membroj sed ankaŭ ĉiuj, kiuj opinias naturkuracadon estonto de la medicino kaj kiuj volas scii detalojn de sana senmedikamenta vivmaniero. Eblos preni seancojn de naturkuracado por pluraj malsanoj. Detaloj ĉe INA-sekretario: Anatolo Gonĉarov, p/k 65 Sankt-Peterburg, RU-197022, Rusio.rete:<anatolog@mail.ru>

August 10 –16 2002. The 42nd Barlaston Summer School.

La Barlaston-somerlernejo estas la plej prestiĝa kaj renoma en Britio. La somerlernejo estas dividita en du grupoj : grupo B celas progresantojn ; grupo C progresintojn. Vi rajtas libere elekti vian grupon kaj dum la semajno 'pendoli' inter la du grupoj laŭ viaj kapabloj kaj viaj interesoj. Ĉi jare estas invitita LENA KARPUNINA (Taĝikujo/Germanujo), aŭtorino de la ege populara (furora) libro – La Bato. Ankaŭ MARJORIE BOULTON kaj KATE HALL niaj tre konataj helpantoj.

Du gravaj avertoj ! Dum la semajno ni preferas ke vi uzu ekskluzive Esperanton... oni manĝas, dormas, drinkas, ripozas kaj laboras Esperante. Krokodiloj ne estas bonvenaj : la somerlernejo celas ĉefe seriozajn esperantistojn. La alia averto estas ; Se vi volas maldikiĝi, ne vizitu nin en Barlaston ! La lernejo famiĝis pro la kvalito kaj kvanto de siaj manĝaĵoj !

Kosto estas : Single bedroom £204 (Concession £190) Shared bedroom £ 180 (conc £166)

Non resident £146 (conc £132)

Ensuite bedrooms carry a supplement of £24 for a single and £30 for a shared. Please make your bookings, sending a £15 per person non-refundable deposit. to Wedgwood memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG. **Please help by booking as soon as possible.**

Biografio de Lena Karpunina

Mi naskiĝis en Ruslando, en urbo Kaluga. Plenkreskis en Duŝanbe, ĉefurbo de Taĝikio. Post diplomiĝo ĉe la Taĝika Ŝtata Politeknika Instituto en 1986 mi laboris en diversaj entreprenoj kiel inĝeniero-automobilisto. En 1988 lernis Esperanton, poste vojaĝis al kelkaj Esperanto-tendaroj, renkontiĝoj, kongresoj. De 1993 vivas en Germanio. De 1997 studas en Humboldt-Universitato en Berlino. Komence mi studis dari, paŝto kaj polan lingvojn, nun studas germanan lingvistikon kaj anglistikon.

En 1997 mi skribis miajn unuajn novelojn en Esperanto. De tiam estis plurfoje premiita ĉe la Belartaj konkursoj de UEA. En 2000 aperis mia unua kaj ĝis nun sola libro "La bato".

“A little known Country” Neville Chamberlain once said.

Now you can get to know it better by taking part in the following:

Ni invitas vin partopreni niajn semajnajn lingvajn seminariojn en pensiono ESPERO en vilaĝeto SKOKOVY, en distrikto Mladá Boleslav, proksimume 75 km norde de Prago.

April 22 - 28

Kiel vi trovos ESPERON? Aŭtomobile vi facile trovos la lokon laŭ la karto. Trajne estas la pensiono la plej bone akirebla el PRAHA- Hlavní nádraží direkte al Turnov, tra Neratovice, Všetaty, Mladá Boleslav, Bakov, Mnichovo Hradiště ĝis LOUKOV u Mnichova Hradiště. La plej multaj geesperantistoj kutime vojaĝas de Prago je la 11,28 horo al Loukov ce Mn. Hradiste. En Loukov antaŭ stacidomo estas haltejo de buso en la sama direkto, kiel alvenis la trajno. Ĝi trafikas ĝis haltejo Žehrov (Jehrov). La vilaĝo Žehrov plene apudas Skokovy kaj la indikilo klare direktigos vin al pensiono Espero, kiu estas 500 m proksime. Ĉu tio estas komplike?

Telefonu de Loukov 00420 / 329 / 789505 kaj la aŭtomobilo veturigos vin je 20 Kc.

Kia estas la programo?

7:30 agrabla gimnastiko en manĝejo 9:00 instruado en grupoj 13:00 promenoj, ekskursoj, libera tempo... 16:00 ŝatokupoj, manlaboroj, kantado... 17:00 joko en gimnastikejo 20:00 prelegoj, diskutoj, rakontado, videofilmoj, lumbildoj, amuzaj vesperoj, ludoj, babilado, frandado...

8:00 matenmanĝo 12:00 tagmanĝo 18:00 vespermanĝo

Laŭ interkonsento la masaĝoj kaj la kuracistaj konsultoj.

Vi povas elekti programerojn laŭ vetero, gusto, tempo, lingvoscio, ktp.

Memoru, ke ni atendas vian prezentadon dum la lasta, sabata vespero por pliamuzigi etoson.

Amike atendas viajn demandojn, proponojn, plendojn kaj konsilojn:

Jindřiška Drahotová, Sadová 745/36, CZ-293 01 Mladá Boleslav, Czesky Respubliko

telefono: 00420/326/731845 vespere

e-majlo: vanek@europa.com e-majlo: drahotovaesperanto@seznam.cz

Kaj prezo? Modesta, kiel la medio. Ĝis 3.000 Kc. Oni pagas surloke. (Note from editor 51 Crowns (Kc) = £1.00)

HOLIDAY LEAFLET I hope to have an eight page leaflet ready for inclusion with this issue of EAB-Update. If it is not included please ask for a copy. It will have details of some of what seem to be the most interesting international holidays taking place this year including the full programmes for Kastelo Gresillon and Kvinpetalo.

From the Clubs and Federations.....

Anonco pri kunveno de Sudmezlanda Esperanto-Federacio je la 13a aprilo 2002 ĉe alternejo St Edward's School, Woodstock Road, OXFORD, OX2 7NN

ODES (Oxford & Distrikta Esperanto-Societo) invitas ĉiujn al posttagmeza kunveno 12.30 ĝis 6.00 pm en belega alternejo iomete ekster la urbocentro sed facile atingebla per aŭto de 'rondvojo' (*ring road*) kaj de urbocentro per aŭtobuso. Starigo de aŭtoj estos senpage.

Do bonvolu rezervi la daton. Por plua informo kaj mapo, telefonu al

Joyce Bunting 01582 760564 aŭ Junio Miles 0208 428 2829.

La enirkosto estos £2 kiu inkluzivas tason da teo aŭ kafo dufoje dum la kunveno. La lernejo pretas vendi temanĝon (kolazionon lau' PIV) kun sandviĉoj kaj kuko, je kosto de £2.50, aŭ oni rajtas porti la propran manĝon.

Doktorino Marjorie Boulton rolos dum la kunveno en programo anoncota. Marjorie jam trifojn prelegis pri Esperanto al la plej aĝaj studentoj en la alternejo. D-ino Kate Hall gvidos komencantojn kaj helpos tiujn, kiuj havas gramatikajn demandojn. La etoso estas tiel bela, ke Marjorie konsilas al fotistoj porti fotilon.

La lernejo petas ke oni ne portu pintajn kalkanumojn (*stiletto heels*). Dankon!

Detaloj pri la programo sekvos post nelonge ĉe: www.esperanto.demon.co.uk au' telefonu kiel supre.

Joyce Bunting (prezidanto SMEF)

English version

Forward notice of a meeting arranged by South Midlands Esperanto Federation to be held on 13th April 2002 at St. Edward's School, Woodstock Road, OXFORD, OX2 7NN.

ODES (Oxford and District Esperanto Society) invites everyone to an afternoon meeting 12.30 to 6.00 pm in a beautiful high school a little outside the city centre, easily reached by car from the ring road and from the town centre by bus. Parking will be free.

So please reserve the date. For further information and a map, telephone

Joyce Bunting 01582 760564 or Junio Miles 0208 428 2829.

Entry will cost £2 which includes two cups of tea or coffee during the meeting. The school is willing to sell 'afternoon tea' of sandwiches and cake for £2.50, or you may bring your own.

Doctor Marjorie Boulton will take part in the programme, to be announced later. Marjorie has lectured to the young men and women of the sixth form on three occasions about Esperanto. D-ino Kate Hall will guide beginners or those seeking advice on grammar.

The situation is so attractive that Marjorie advises photographers to bring their cameras!

The school requests that no stiletto heels be worn on the premises. Thank you!

Details of the programme will follow shortly on: www.esperanto.demon.co.uk or telephone as above.

Morecambe Bay Esperanto Association.

This Association have recently restarted their bulletin 'De Maro al Kamparo' in memory of Sheila Bootham who died during the last year. It is a 12 page well illustrated publication and copies can be obtained from Brian & Jane Rayner, 15 Woodland park, Barrow-in-Furness, Cumbria, LA14 5XR, at a cost of £1.00.

(EAB-Update editor would welcome samples from other clubs or federations)

Ĝi revenas!

Mi petas, bonvolu anonci en venonta Update ke ĉi jare ni denove aranĝos semajnfinan renkontiĝon - "Internacia Amikeca Renkontiĝo 2002" - ĉe The Friars en Aylesford, Kent.

Datoj estas: de vendredo 20a ĝis lundo 23a de septembro 2002.

Informoj kaj aliĝiloj estas haveblaj de:

Anica Page, 7 Hampton, Great Holm, Milton Keynes, MK8 9EP

Granda Vorto

"La ideo de eterneco estas tiel vasta, ke neniuj homoj povas kompreni ĝin."

"Sensencaĵo! Aĉetu aŭtomobilon partopage kaj vi baldaŭ komprenos, kio estas eterneco."

BOOKS FOR ALL

Klara Vortaro Esperanta-Araba Rotterdam, 1998. 308p. 22cm.	Georgo Abraham	£8.70
Muminvalo T. Jansson £7.68 Helsinki, 1993. 109p. 25cm. Trans. E. Blick. Highly popular childrens book		
Ĉashundo de la Baskervilles, La Jekaterinburg. 1998. 168p. Trans. W. Auld.	Conan Doyle	£4.00
Ĉina Antologio 1919 - 1949 Peking. 1986. 602p. 21cm. Contributions from the most representative writers of the period.		£6.40
Verdaj Donkiĥotoj Vienna, 1996. 175p. 23cm. The least know work by Baghy + satirical portraits of typical Esperantists.	J Baghy	£7.45
Ĉina Antologio 1949 - 1979 Peking. 1989. 418p. 21cm. Contributions from the most representative writers of the period.		£6.40
Ĉinaj klasikaj poemoj ilustritaj Peking. 1990. 63p. 19*27cm. Richly illustrated anthology of short poems from ancient China.		£4.27
Australia Antologio Pisa. 1988. 431p. 21cm. Ed. Alan Towsey. A varied and impressive collection.		£22.44
Australia Felix Vienna, 1999. 132p. 23cm. Stories from both past and present of Australia.	T Steele	£7.10
Aŭstralia-Esperanta Vortaro Bentley, 1990. 54p. 21 cm. Words and expressions from down-under.	R L Harry V Gueltling	£3.00
Kie boacoj vagadas Vienna, 1994. 91p. 23cm. Interesting stories of the writer's travels in Lapland.	E. Salovaara	£6.14
Tena. Hejmo en Mezeuropo Zagreb, 1996.	Spomenka Štimec	£6.72
Tiu toskana septembro Budapest. 1990. 138p. 21cm. Passion and intrigue after the discovery of a murder.	Corrado Tavanti, István Ertl	£5.74
Kiel akvo de l'rivero Pisa, 1990 (3rd Ed.). 487p. 22cm. Hb. A classic original work with both intrigue and humour.	Schwartz	£9.75
Kunularo de l' Ringo, La Jekaterinburg. 1997. 543p. 20cm. Tr. W. Auld. The first book in the famous series	J.R.R. Tolkien	£12.48
Pajleroj kaj stoploj. Elektitaj prozaĵoj Rotterdam, 1997. 6+342p. 21cm. Essays, stories, translations and reviews	William Auld	£12.19

Please add 15% for post & packing. Minimum 25p. Orders over £45 post free. Strictly payment with order to EAB, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent. ST12 9DG
Tel. 01782 372 141. Before ordering it may be advisable to contact the office to check continued availability.

Ĉiutage Esperanto

PLI VARMA VINTRO

“Pluvo kaj ne neĝo dum Kristnasko! Kio okazis al nia tradicia vetero?”

“Tutmonda varmiĝo (*global warming*)!”

“Mi legis, ke la polusaj glaĉeroj (*polar icecaps*) degelas (*are melting*), kaj la nivelo de la oceanoj plialtiĝadas (*keep on getting higher*)”.

“Mi ankaŭ legis pri ĝi. Sed eble tio estas nura ekzokuzo fare de la registaroj aŭ magistratoj (*town councils*) por senkulpigi sin. Laŭ diskuto televida, oni permesas tro da domkonstruado sur la inundeberaĵoj (*flood plains*), eĉ kontraŭ la konsiloj de la koncerna ministro. Mi kompatas tiujn, kiuj (*the ones who*) aĉetis domojn dum la bela vetero.”

“Ankaŭ mi. Ili havigas al si hipotekon (*mortgage*) kaj asekuron (*insurance*), sed post la unua inundo, la asekuragentoj diras ke la firmaoj ne reasekuros la domon. Do oni ne nur timas la estontecon, sed ankaŭ povas prognozi (*predict*), ke denove inundo minacos.”

“Ĉu ne unu de la devoj (*obligations*) de la magistratoj estas trakti (*deal with*) la problemon?”

“Kompreneble (*of course*). Sed kiam mankas sufiĉe da mono en la kaso, ili amas nur flikaĉi (*patch things up*) per neadekvataj rimedoj (*measures*), esperante, ke la posta inundo ne estos tiel severa.”

“Kaj sendube ĉiu kulpigas ĉiun krom si.”

“Certe! Alie ili devus multon elspezi, levante (*by raising*) aŭ la lokajn impostojn (*council taxes*) aŭ la premiojn (*insurance premiums*), depende de kiu ŝuldas.”

“Kia malgaja temo (*gloomy subject*).”

“Do ni parolu pri io pli gaja. Kiel estas ĉe vi?”

“Ni ne malvarmumis (*caught a cold*), la frostoj ne detruis niajn florojn kaj arbustojn. La hejtado de la domo pli malmulte kostis, kaj la suno foje estis tiel varma, ke ni povis sidi multajn tagojn en la ĝardeno—portante palton (*overcoats*), evidente.”

Don Lord

Notes.

- (1) *Ankaŭ* comes before the word it emphasizes. *Ankaŭ mi* means *Me too*.
- (2) *Prognozo* means a forecast. *Prognozo* is a doctor's prognosis and a *veterprognozo* is a weather forecast.
- (3) *Premio* means an insurance premium, and *premio* is a prize.
- (4) Here *palto* is singular in Esperanto, because they only wore one overcoat each.
- (5) *Krom* seems to cause problems for a number of English-speakers. It comes from a Russian word *Krome*, translated *besides, but, except, save*. Its basic meaning is *apart from, with the exception of*. So, *Mi vizitis mian amikon ĉiun vesperon krom ĵaŭdo* means *but I didn't go on Thursdays*. It is sometimes used with *ankaŭ*, as in *Krom la sandviĉoj, li (ankaŭ) kunportis kukojn*. It does not take the accusative *-n*, except in very rare cases where otherwise there might be ambiguity. This is because *krom* is a preposition.

An interesting letter to Ian MacDowall shows the value of Esperanto in travelling from country to country.

From: msalas@uach.cl (marcos salas) To: IanMacDowall@aol.com

Kara Ian


La celo de tiu ĉi letero estas rakonti al niaj amikoj pri ni kaj kion ni faris dum la jaro 2001. Ne necesas respondi, sed estos bonvene se vi konfirmos ke vi ricevis ĝin.

La familio fartas bone, la infanoj jam finas la lern-jaron. Paula estas 9-jara kaj finas la trian gradon je baza lernejo. Ŝi ankoraŭ bone parolas la anglan lingvon kaj lernas kiel ludi tenison. Ŝi estas tre alta kaj ŝatas muzikon, ŝi ricevis muzikaparaton kiel datrevenan donacon kiam ŝi fariĝis 9-jara. Carla jam estas 5-jara kaj vizitas infanvartejon, venontjare ŝi iros al enkonduka jaro je la sama bazlernejo kie Paula studas. Edukado en Ĉilio komenciĝas per enkonduka jaro (ne deviga), sekvas 8 jaroj da deviga edukado. Ambaŭ fratinoj estas tre kverelemaj kiel kutime estas knabinoj. Nun estas varma vetero kaj ni havas platan akvujon de 3 metroj diametre kaj duonmetre profunde kie ili ŝatas "naĝi". Tatiana zorgas pri la infanoj kaj aktive partoprenas en lerneja administracio kiel prezidantino de gepatra asocio.

Rilate al Marcos, pro profesiaj aferoj li loĝis dum tri monatoj en Germanio kaj Pollando. Li estis invitata de Hamburga Teknika Universitato por kunexplorado pri ŝipoj. Bedaŭrinde ne eblis al la familio vogaĝi kune, pro kio Tatiana kaj la infanoj restis en Ĉilio dum la patro ĝuis nordan someron ĉar la vizito okazis dum Aŭgusto, Septembro kaj Oktobro.

En Hamburgo Marcos loĝis ĉe du esperantistaj familioj (dankon Kai, Sylvia, Lars kaj Christine) kaj partoprenis aktivadojn de Hamburga Esperanto Klubo kie li montris lumbildojn pri Ĉilio. Dum la restado en Germanio Marcos vizitis Wismar kie li partoprenis datrevenan feston de germana amikino kiu kunuzis oficejon dum studado en Anglio. Krome li vizitis Berlin kaj Potsdam kie li prelegis en loka teknika universitato kaj loĝis ĉe

(continued page 15)



(R) = Uzu nur la radikon

HORIZONTALA

- 1 Ritme movi kun akompano de muziko. (4) (R)
 3 Sidi sur ovoj por ke embrio povu maturiĝi. (4)
 6 Konjunkcio. (2)
 7 Speco de angla biero. (2) (R)
 8 Pli ol kutima. (6)
 10 Plurala pronomo de la unua persono. (2)
 11 Vi dormas en ĝi. (3) (R)
 12 Peni ne renkonti iun. (4) (R)
 14 Peza, unupeca maso de malmola materialo. (4) (R)
 16 Pomvino. (5)
 18 Grasa, vegetaja fluaĵo uzata por kuirado. (3) (R)
 20 En iu loko. (2)
 21 Malplezuro pro senintereso. (4)
 22 Guto de akvo el la okulo. (5)
 24 Lirika poemo. (2) (R)
 25 Terkolo. (4) (R)
 26 La finaĵo por la pasinta tempo. (2)

VERTIKALE

- 1 Batalo inter du personoj. (4) (R)
 2 Hejmo por birdoj. (4) (R)
 3 Prebutono sur piano aŭ tajpmaŝino. (5)
 4 Daŭra horizontala aerfluo. (4) (R)
 5 Plurala pronomo de la tria persono. (3)
 6 Organo de aŭdkapablo. (5)
 9 Tuŝi per la lipoj. (4)
 13 Sankta bildo. (5)
 14 Haltigilo. (5) (R)
 15 Fabela estaĵo. (3)
 16 Ĝi estas dekduono de futo. (4)
 17 Esprimi per vortoj. (4)
 19 Sin amuzi. (4)
 23 Sufikso de la pasiva futura participo. (2)

Solve de Krucvort-enigma 16.

Horizontale

1. Fier. 4. Ramp. 8. Lum. 9. Soleo. 10. Abel. 12. Ne. 13. Vojaĝ. 15. Mut. 16. Alg. 17. Kio. 18. Akra. 20. Mort. 21. Aŭto. 23. Ĉies. 24. Najlo. 25. Ot.

Vertikale.

1. Flav. 2. Iu. 3. Emajl. 4. Rol. 5. Al. 6. Menuo. 7. Poet. 9. Seĝ. 11. Bagatel. 14. Oazo. 15. Miaŭi. 17. Kraĉ. 19. Kost. 20. Mon. 22. Teo.

(continued from page 14)

kaj loĝis ĉe samideanoj dum kelkaj tagoj (dankon Martin kaj Alex). Potsdama Parko estas vere vizitinda kaj Berlino estas impresa urbo kun multaj muzeoj kaj monumentoj.

Ankau pro profesiaj kialoj Marcos vizitis Pollandon, tie li partoprenis fakkongreson (ŝipingenieroj) organizata de Universitato de Gdansk, krome li feris dum tri semajnoj kaj vizitis Jastrzebia Góra, Malbork, Varsovion, Krakovon, Wola kaj Wrocław. Pollando estas vere vizitinda lando kaj denove amikemaj samideanoj gastigis kaj dikigis lin (dankon Mariola, Danuta, Edward, Wieslawa, Bozena, Irena, Georgo, ĉiuj la Ventanoj, Andrzej, Joanna, Marek, Aniela kaj Marcin). En Varsovio gastigis min la "Ventanoj" t.e. membroj (plejparte gejunuloj) de Esperanta Klubo "Varsovia Vento". Marcos havis tre bonan turisman Gvidanton (dankon pro Kopetka Anja) kaj vizitis tombon de nia kara D-ro Zamenhof. En Krakovo Marcos renkontis je la unua fojo longdaŭran korespondamikon (pli ol 15 jaroj) Elzbieta Janusz.

Fine de Oktobro Marcos revenis al Ĉilio kaj kune kun Tatiana partoprenis Tutlanda Ĉilia Esperanta Renkontiĝo, aliĝantoj estis8. Fakte estas iomete pli da esperantistoj en Ĉilio sed la lando estas tre longa (4 mil Km) kaj ne eblis al kelkaj vojaĝi 800 au 1000 Km ĝis ĉefurbo Santiago.

Nun ni ĝuas someran veteron kaj preparas Jarfinajn Festojn. Ni trinkas "cola de mono" lauvorte "simia vosto", ĝi estas alkoholaĵo farita el lakto kaj brando (ne estaj simiaj vosto aŭ ia simia ingredienco). Festmanĝaĵo dum Kristnasko kaj novjartago estas ŝafido rostita per karbofajro. Tagoj estas longaj kaj noktiĝas iom post la 9-a PM, tio ebligas al infanoj ludi per siaj Kristanaskaj donacoj ĝis malfrue ekstere.

Ni deziras al vi tre Feliĉan Kristaskon kaj tre sukcesan jaron 2002. Ni ĉiam memoras pri niaj Esperantistaj amikoj ĉie en la mondo, plejparte en foraj landoj, ni ĝojas ke iam ni estis kune kun vi kaj ĝuis agrablajn amikemajn momentojn.

Ni trinkos "cola de mono" je via sano. Amike viaj Marcos, Tatiana, Paula kaj Carla
 Casilla 979, Valdivia, Chile. msalas@uach.cl

EAB-UPDATE
Editorial Address
Eric Walker
Downham Reach Cottage
Nacton, Ipswich, IP10 0LA
Tel: 01473 717 088
Fakso: 01473 274 531

Retpoŝto: eabupdate@esperanto.org
(Please note: only editorial matter to the above,
everything else should go to Barlaston)

Deaths. With sadness we report the deaths
of:

Stanley Carpenter	North London
Walter Livsey	Isle of Man
Ray Smith	Worcester
Peter Alan Gardener	Sliven, Bulgaria
David Featherstone	Surrey.

New Members.

Jan Swynnoe	Hereford
-------------	----------

New Supporter

Elisabeth Cirrio	Wolverhampton
------------------	---------------

Calendar of Events..

May 3-5. British Esperanto Congress. Stoke-on-Trent. Further details from EAB office. A memorable occasion!

May 17-19. SATEB weekend at Barlaston. All welcome!

May 24 - 27, 2002. 97th Scottish Esperanto Congress, St. Andrews

Info: Tom Neil, 37 Soutar Crescent, Perth PH1 1QB
Tel: 01738 623 699 E-mail: tomneil@tinyworld.co.uk

June 2-10 Baltic Sea Int. Holiday. Details in Hol. leaflet
August 3-10 87th Universala Kongreso, Brazil. See holiday leaflet for more details.

Aug. 10-16. Esperanto Summer School at Barlaston. Put this in your diary NOW!

September 7-8. Scottish Study Weekend at Dunblane.
Guest Speakers: Girvan & Maire McKay; theme: Wedgwood Arboretum Project and Cultural significance of trees and flowers.

September 20-23 Aylesford Weekend. See page 12.

October 4-6 2002. Faulhauber Weekend in Elspect, Holland. An excellent short holiday with firstclass lecturers and not far away from these shores. Information from Eric Walker.

Dec. 27-Jan 3 2003. 19th New Year International Festival Borken, Germany. (See the Holiday Leaflet for details).

Mines Advisory Group.

I have received a letter from M.A.G. "...Over the last couple of weeks we have received some donations from various people who say they read about M.A.G. In EAB-Update." Many thanks friends.

Pozitiva kaj Inspira

Ian Fantom

Dum miaj gefiloj laboris kaj studis, mi havis la plezuron partopreni en junulara renkontiĝo en Uppsala, Svedio. La evento estis la dua seminario en la serio 'Esperanto@Interreto', kiun organizis TEJO - la junulara sekcio de UEA. La temo ĉifoje estis 'Rete kunlabori'. Oni invitis min kiel kontribuanton al la programo pro la diversaj projektoj kiujn mi momente evoluigas rilate al la retkurso 'Esperanto Viva!' [<http://esperanto.org/espviva>].

Kontribuis ankaŭ Radojica Petrovic pri la projekto Interkulturo, kiu instigas kontaktojn inter lernejaj infanoj, por kiu celo ili uzas Esperanton. Tiu projekto, gvidata de la Tria Universitato de Romo, listigas 97 kunlaborantajn klasojn en 28 landoj - 11 en Zimbabvo, 7 en Togolando, kaj neniujn en Britio.

[<http://lps.uniroma3.it/kler>, <http://lps.uniroma3.it/kler/halo.htm>]

Bonegan ekzemplon de reta kunlaborado priskribis Bertilo Wennemgren; temis pri la komuna retvortaro ReVo [<http://purl.org/NET/voko/revo/>], kiun oni kunlabore produktas por doni difinojn kaj multlingvaj tradukojn de la Esperanta vortprovizo. Intere prezentis Franko Luin pri sia laboro ĉe esperanto.nu kaj por la sveda asocio [<http://www.esperanto.se>]. Kadre de tiu li starigis liston de Esperanto-gazetoj, kun ligoj al la rilataj retpaĝoj. Tion li ampleksigis por inkluzivi la mondan gazetaron, kaj nun tiu retpaĝejo estas konata en Svedio kiel ĉefa interreta fonto de informoj pri la monda gazetararo. ['kiosko' ĉe <http://www.esperanto.se/kiosk/>]

Multaj venis al la seminario por lerni specifajn teknikojn pri retpaĝfarado, retprogramado, datumbazoj, vikioj (kiuj ebligas rapidan starigon de retpaĝoj), kaj pri bona aspektigo. Vere la programo estis plenplena de seriozaj lernsesioj. La tuta semajno estis pozitiva kaj inspira. Imagu: kvardeko da Esperantistoj diskutantaj interretajn aferojn dum semajno, kaj neniu ... neniu ...plendaĉis pri supersigno.

La eventon oni organizis en 'gimnazio' Katedralskolan - ekvivalento de brita sesaklasa kolegio, sed kun iuj pli junaj lernantoj - de la 27a de oktobro ĝis la 4a de novembro. La vicrektoro, kiu respondecis pri internaciaj studoj, subite aperis, ne antaŭe konstatinte pri ia Esperanto-aranĝo; kiam li subite ekparolis Esperante li klarigis, ke li antaŭe instruis la lingvon tie, kaj poste li gvidis grupon el ni tra la historia konstruaĵo.

La organizado estis ekzempliga. Tejo gajnis por la seminario subvencion de baltmara fonduso, kiu eĉ helpis pri vojaĝkostoj de ĉeestantoj. Publikajn rilatojn ili ne neglektis; aperis granda artikolo en la ĉefa gazeto de Svedio, kaj elsendo en la televido. Mi revenis kun sento ke mi ĵus spertis la kernon de la nova movado, kiu antenaŭenpuŝos aferojn grandskale en la nova epoko.

[Retpaĝoj ĉe: <http://www.ikso.net/echei/2001/index.html>]

* * * * *

Copy date for the next issue is May 10.

The final words....

Iufoje la fama franca verkisto Tristan Bernard konsilis al sia amiko.

"Se vi troviĝas kun virino kaj vi scipovas legi en ŝi ĉion kvazaŭ en libro, ne apliku la sistemon de Brajlo....."